

AVENO #39 - Ekologio kaj Ekonomio

Januaro - Decembro 2013

Ĝenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj. Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion.

Pro trovi temon pli facile bonvolu serchi laŭ kapvorto aŭ jene (uzu la antaŭan „##“)

Ekologio, Klimato, Sano, ĝenerale kaj miksitaĵoj

Maro, Marbordaj Regionoj, Riveroj, Lagoj

Agrikulturo, Arbaroj

Alternativaj Energioj & Efikeco

Atomenergio ktp

Minado, Resursoj, Nafto & Ercoj, Kemio, Fajroj, Eksplozoj

Ekonomio, Financoj, Tekniko, Trafiko

Koncize: **Organizajhoj de esperantistoj subtenataj de AVE-anoj**

AVE: <http://www.verduloj.org>, novaj artikoloj je la enirpagho, aliaj sub "Dokumentoj

Mazingira en Tanzanio: www.verduloj.org/mazingira.htm

PIEADC regiona evoluo en DR Kongo: www.kamparanasolidareco.weebly.com

aliaj: <http://www.verduloj.org/afriko.htm>

Amikoj de la Tero/ Friends of the Earth - informrica retejo: (en, es, fr): <http://foei.org/>

Amikoj de la Tero en Europo: (Europaj lingvoj) <http://www.foeeurope.org/network>

Raportoj kaj postuloj pri naturprotektado ĉefe en Europo: <http://www.euronatur.org>

2013-10-30 **Solidareco kontraŭ la Malsato** - la nova bulteno, kun raportoj pri multaj afrikaj grupoj, estas pretaj: Fakte mi miris pri la decido subteni nun nur per mikrokreditoj - kiu ricevos la interezon - ĉu ĝi servos por la organiza laboro ?
<http://www.recim.org/solidareco/ms109-eo.pdf>

2013-10 **Distribua ekonomio - nova frakcio ene de SAT:**

<http://www.satesperanto.org/Kio-estas-la-FRAKCIO-POR-DISTRIBUA.html>

2013-09-28 **Alternativa Nobel-Premio al 4 elstaruloj:**

Hans R. Herren, Svisio, laboris por pli bona agrikultura politiko - aparte por malgrandaj bienuloj: (de, en, fr) <http://www.biovision.ch/home/>

Paul Walker, Usono, laboris sukcese por la tutmonda abolicio de kemiaj armiloj.

Raji Sourani, Palestino, engaghis por la Homaj Rajtoj kaj Jur-shtateco.

Denis Mukwege, D.R. Kongo, sanigis virinojn kiuj estis sekse perfortitaj aparte de soldatoj. Li ankau nomumis la respondeculojn, certe danĝere.

La civil-socia fonduso kiu premiigas: <http://www.rightlivelikelihood.org/>

2013-09 **Komuna agado-plafono de la 10 Verdaj Civil-sociaj Organizajhoj:**

The Green 10 are ten of the largest European environmental organisations/networks.

They coordinate joint responses and recommendations to EU decision makers.

Membership of the Green 10 alone is more than 20 million people.

<http://www.green10.org/>

2013-08 Aplikajhe Informilo: **Ĉu kosmetikajhoj entenas kseno-hormonojn ?**

Kseno-hormonoj estas artefaritaj kemiaĵoj, kiuj agas simile kiel la naturaj hormonoj. Kutime oni aplikas tiajn kemiaĵojn ĉar ili havas avantaĝajn ecojn: ekz-e moleco.

Legu pli pri ksenohormonoj en nia artikolo pri plastajhoj en la akvaroj:

http://www.verduloj.org/akvo_plast_2012.pdf

La germana asocio (BUND) de Amikoj de la Tero kreis informilon: vi entajpas la EAN-kodon je via komputilo - ricevos la liston de ĉiuj komponantoj. Pli elegante vi povas foti la strio-kodon pere de iPhone, aŭ alia inteligenta mobil-telefono:

<http://www.bund.net/toxfox>

Por ekscii la diversajn komponantojn de la kosmetikajho - vi povas uzi:
<http://www.codecheck.info/> - tie vi ankaŭ pova serchi alternativan produkton.

Wolfgang Knabl kuraghe lanchis la **retinformilon "Mondo-Gazeto"**:
<http://www.mondogazeto.com/>

Libroj pri komunaj vivejoj: unu el tiuj libroj montras 333 komunumoj, inter ili 30 ekologiaj vilaghoj - en 22 landoj; kaj 3 aliaj libroj: <http://www.Eurotopia.de>

5 jaroj da **Ozeaneum en Stralsund** (norda Germanio):
Tiu akvario kaj informcentro ebligas sperti kiu vivas en la maro, kaj kiel funkcias la vivo en la maro: (de, en, pl) <http://www.ozeaneum.de>

--- ---

Ekologio, Klimato, Sano, ghenerale kaj miksitaj temoj

2013-12-27 **Ventoradoj en Laponio** - chu tolerotaj de la boacoj ?
En la sveda parto de Laponio Enercon konstruos por Svevind nordokcidente de Pitea, en Markbygden eble la plej grandan ventoenergio-parkon kiu enhavos 1101 da ventoradoj. La boaco-bredistoj timas, ke iliaj gregoj povus fughi pro la strangaj monstroj kun fulm-lumetoj. La samooj malshatas Vattenfall pro senrespekta sinteno kontraŭ sia popolo. (lau Kathleen Hildebrand, Sueddeutsche Zeitung, 2013-12-27)
Komento AVE/mw: Chu oni jam esploris la chi-rilatan konduton de boacoj ? Lau mia scio en Finnlando jam staras kelkaj ventoradoj.

2013-05-09 Nigra mejlo-shtono atingita: **CO2 atingis 400 ppm** (mezurita sur Mauna-Loa en Hawajo) la plej longdaŭra mezurado da CO2 - unue: 315 ppm en 1958.

2013-11 **Klimato-shanghigo okazigas katastrofojn:**
Pri la tajfunego (vento-rapideco super 300 km/h) kiu detruis parton de Filipinoj vi certe legis; kaj eble ankaŭ pri la pluvego (kvanto de 1 jaro en unu tago) sur la italan insulon Sardinio pro la tro varma Mediteraneo, ktp...

2013-11-22 **Varsovio - COP19** - Civil-Sociaj Organizo forlasis la Klimatokonferencon: Pluraj shtatoj agas kontraŭ la bezonata redukto da CO2, kaj ne emis redukti la CO2-eligojn; alfabete: Australio, Brazilo, Chinio, Germanio, Hindio, Japanio, Pollando, Usono. Fakte la afero estas pli komplika:
Unue - rilatas al la poulacio, kaj al la klimato (chu oni bezonas hejti dum vintro, chu oni fridigas la domojn dum la somero)-
Due - rilatas al tio, kion oni eksportas; Germanio ekz-preskau ne plu produktas shtalon, sed importas, ktp.
Trie - karbo-industrio estas grava pro la laborlokoj, en Pollando, sed ankaŭ ancorau en Germanio, la sub-chiela ekspluatado da bruna-karbo detruas arbarojn kaj pejzaghojn. Kvare - la emisio-certifikatoj kostas tro malmulte, pro tio estas finance interese produkti kurenton pere de karbo-centraloj (au atom-centraloj), anstataŭ en kombinitaj gas-fuelitaj varmo-elekto-generatoroj (VEG); kiuj estas pli flekseme uzeblaj kune kun la regajneblaj energio-fontoj; krome VEG estas ne centralaj, tiel la varmo estas uzebla por industrio kaj por loĝ-domoj.
(lau diversaj informoj, i.a. www.ard.de)

2013-11-17 **Australia** registaro ? La **popolo agas** por bremsi la klimato-katastrofon: La 17an de novembro kolektighis 60 000 aktivuloj en la diversaj chefurboj de Australio por postuli de la registaro 'Agu nun!' por savi la landon kaj la planedon. Morgau la nacia registaro intencas debati por nuligi la nunan legon pri imposto kontraŭ firmaoj kiuj produktas polucion - mi supozas ke temas chefe pri karbondioskido. Feliche la homoj vidas en pli foran estontecon kaj estas pli kuraghaj : nun trovighas 2milionoj da sunpaneloj en Australio, kompare kun 3000 en 2010.
(lau informo de Jennifer Bishop)

Komento AVE/mw: Ni chiu devus altigi la efikecon de la energio-uzado.

2013-11 **Hindio premas aktivulojn**, baras la aliron al la Homaj Rajtoj:
Jiten Yumnam aktivis en la nord-orienta hinda lando Manipur por protesti kontraŭ detruivaj river-barajhoj, ĉar ili detruas la viv-bazon de la indigenoj.
Li estis plurfoje subpremitaj de la polico. En Manipur mankas la Komisiono pri la Homaj Rajtoj.

Bonvolu subteni la proteston flanke de la NRO/CSO International Rivers:

<http://org.salsalabs.com/dia/track.jsp?v=2&c=HsD0sdPS2Z3VkichUbHiLayNGfYbqpm%2B>

Retejo de Internaciaj Riveroj (cn,en,es,pt): <http://www.internationalrivers.org>

2013-11-16 **Klimato - Japanio perdas kuraghon pli-efike uzi energion.**

Pro la Atomkatastrofo Fukushima Japanio unue komencis pli efike uzi la elektran energion. Sed ili ne kuraghas daŭrigi la vojon redukti la energio-bezonon.

Japanio eligas 1240 milionoj tunoj da CO₂ jare; la 5-a shtato el la plej grandaj CO₂-eligantoj. Pokape tio signifas 9,8 tunoj jare, same kiel Germanio.

Je la nuna klimatokonferenco en Varsovio Japanio diris, ke ili reduktos la eligon inter 2005 kaj 2020 nur je 3,8% , anstataŭ la 20%, promesite antaŭ Fukushima.

*) laŭ tabelo de EDGAR, de la EU-Komisiono, BZ, 2013-11-11,p.24

(laŭ Angela Koehler, BZ, 2013-11-16, p.21)

2013-10-20 **ENI-AGIP, Italio, planas uzon por palmoleo-dizelo:**

La oleo venos el Malajzio kaj Filipinoj, el 180 000 ha da palmoleo-forsto. Tio signifas, ke ĉ. 1200 Orang-Utang perdos sian viv-spacoon - kaj sekve de tio siajn vivojn.

Shanghi nafton per palmoleo ne estas ekologia agado. Alternativo estas konverti uzitan oleo (el kuirejoj) kaj similaj grasajhoj, au produkti ĝin el oleo-plantoj (kolzo kaj aliaj semoj) kiuj kreskas en la sama lando en kiu oni forkonsumas la dizelon. Sed tiam oni diskutas pri „benzinujo au telero“. Fakte - manghi malpli da viando liberigos grandajn areojn pro produkti plantojn por industria uzo.

Bonvolu subskribi la peticion al la itala registaro - ĝhis nun la teksto estas en la itala kaj germana:

(de, it) <http://www.regenwald.org/aktion/929/180-000-hektar-regenwald-von-oelkonzern-bedroht?mt=1698&v=0&ref=nl>

2013-10 **Protestu kontraŭ akvo-barajhego Murum en Sarawak, Malajzio:**

La registaro planis kaj oni komencis konstrui grandegan bar-lagon (2 950 km²) en la regiono de Penan & Kenyah-indigenoj, kiuj ne estis demanditaj, kaj ne ricevos kompensajhon. Ili havas la rajton uzi tiun terenon (Native Customary) tereno, kiu ankau enhavas grandan pluv-arbaron. Ili protestis kaj baris la straton.

Bonvolu kunhelpi per via subskribo al peticio de la civilsocio organizo pri internaciaj pluvarbaroj: (IRN) <http://www.internationalrivers.org>

2013-10 **Germanio: Nova Nacia Parko Norda-Nigra-Arbaro**

Jhus kreighis nova Nacia Parko en Germanio, en la norda parto de la Nigra Arbaro. Ankoraŭ temas pri du najbaraj terenoj. Kaj nun komencighas la evoluo.

(de) <http://www.schwarzwald-nationalpark.de/index.php?id=1>

Malpli fortan protekton por la naturo donas **Naturparko**, ekz-e en la suda Nigra Arbaro: (de) http://de.wikipedia.org/wiki/Liste_der_Naturparks_in_Deutschland

Kaj jen listo de al aliaj Naciaj Parkoj en Germanio:

(de) http://de.wikipedia.org/wiki/Nationalparks_in_Deutschland

En Esperanto vi trovos turismajn informojn kaj priskribojn pri la **Nacia Parko Harz:**

(eo) <http://www.nationalpark-harz.de/de/downloads/esperanto/>

(kaj ĉe AVE en eo) <http://www.verduloj.org/europo.htm> (> Naturprotekto)

2013 -10-07 **Marihuano - por malsanaj maljunoj en Israelo**

THC - kausas haluzinon

CBD - reduktas dolorojn kaj helpas pri imunaj malsanoj, subtenas la mem-sanighon.

Aparte je infanoj kiuj havas kanceron ghi helpas mirinde. Ghi reduktas la dolorojn kaj re-venas la apetito, kiu necesas por fortigi la korpon. Oni reportis ech pri malapero de komencighinta kancero.

http://www.tagesschau.de/videoblog/zwischen_mittelmeer_und_jordan/videoblog-schneider314.html

2013-10-01 **Glifosat / Roundup venenigas ne nur plantojn:**

Ghi estas la plej ofte uzata herbicido en la mondo. En Europo oni forgesis evalui ghin en 2012, tial oni rajtas vendi ghin ghis 2015.

Universitato de Leipziger esploris 240 danajn bovinojn kiuj estas tenataj „kiel kutime“.

La urino de chiuj bovinoj entenis Glifosat-on, kaj oni trovis altigitajn kvantojn da enzimoj kiuj montras al damaghitaj organoj kaj muskoloj.

Oni kritikis, ke la esploro ankoraŭ ne entenis bio-bovinojn (kiuj manghas nur gresojn kaj herbojn).

Bonvolu subteni la peticion al la germana ministro pri agrikulturo kaj protekto de konsumantoj, nun dumtempe s-ro Friedrich.

http://umweltinstitut.org/gentechnik/aktionen/onlineaktion_roundup-910.html

2013-09-27 **Sovaghaj bestoj en Europo fartas iomete pli bone:**

Bisono, Nigra Cikonio, Gufo, kaj Lupo revenis au plimultighis, dank al pli severa protekto kaj pli grandaj teritorioj (reservujoj).

Sed aliflanke reduktis la biodeiverseco kaj kvanto rilate birdetoj kaj papilioj, kiuj bezonas florantajn herbojn sur la herbejoj kaj ekstensive uzitaj herbejoj - char oni plialtigis la agrojn, kaj utiligas la herbejojn pli intense.

(Iau Jakob Struller, taz, 2013-09-27, p. 9)

2013-09-28 IPCC Monda-Klimato-Raporto (pluraj detaloj):

Pagharo en la germana, por akompani la IPCC-Raportojn: <http://www.ipcc14.de/>

Mi jam menciis la altighon de la temperaturo en mara regiono, t.n. Grenlanda Maro, tuj sude de la Arkta Oceano (inter Grenlando kaj Spitzbergen):

En profundo de 2000 m oni mezuris altighon de 0,3 °C inter 1980 kaj 2012 - la diagramo montras ke la altigho komencighis nur 1980 !.

Tio signifas dek-oblan varmighon kompare kun la averagho en aliaj maroj.

Fakte temas pri enfluo de varma (malpli malvarma) akvo el la Arkta Oceano - char la surfaco de la Grenlanda Maro restas pli varma (-0,9) ol antaŭe (-1,8), kaj tial ne plu enprofundighas.

Konciza informo, germane: <http://sonnenseite.kjm4.de/r/6316dfa19467ms392.html>

Publikajho, angle: R. Somavilla, U. Schauer and G. Budéus: Increasing amount of Arctic Ocean deep waters in the Greenland Sea, GEOPHYSICAL RESEARCH LETTERS, VOL. 40, 4361-4366, doi:10.1002/grl.50775, 2013

2013-09-28 **Homa Influo al la klimato prikalkulita:**

La temperaturoj en la stratosfero malaltighis, kaj en la atmosfero altighis dum la lastaj 34 jaroj. Kalkuloj montras la homan influon adicie al tiu de naturaj fenomenoj.

(en) <http://phys.org/wire-news/140862242/further-evidence-on-human-global-warming.html>

2013-09-27 **Situacio de nia monda klimato:**

La raporto de IPCC (internacia konsilio pri klimato) alvenis. Mi ankoraŭ ne legis ghin entute. Sed la temperatur-altigho restas evidenta:

Dum la lastaj 15 jaroj la temperaturo de la aero malpli radipe altighis (0,05°C jare) ol antaŭe (ch. 0,1 ° jare). Kaj la mar-nivelo altighos, kvankam malpli rapide (Iau nunaj atendoj).

<http://www.tagesschau.de/ausland/klima-ipcc100.html>
ghenerale en Esperanto: <http://eo.wikipedia.org/wiki/IPCC>

Alia grava afero estas la varmigo de arktaj mar-akvo. Esploristoj de la Alfred-Wegener-Instituto en Bremen mezuris ke la temperaturo de la profunda akvo ĉirkaŭ Grenlando altighis je 0,3° ek de 1980 - parte pro shangho de la maraj fluoj.
Tiu energio egalus al aera temperatur-altigo je 4° C super la Europo !!!

Komento AVE/mw: Certe periodaj klimataj fenomenoj kiel El Niño/La Niña kiuj havas periodecon de pluraj jaroj influas la temperaturojn - vidu pri tio en Vikipedio
http://de.wikipedia.org/wiki/El_Niño
(en tiu artikolo oni skribas Niño/Niña, kio pli adekvatas al Esperanto)

2013-07 En la Amazonia pluvbaro en Ekvadoro vivas du **indighenaj triboj en libervola izoleco.**

Pro la triboj de Tagaeri & Taromenane la registaro deklaris tiun parton tabua por eksteruloj.

Tamen arbofalistoj kaj oro-sercantoj chasas la indighenojn, por formeti tiun baron. Sed aliaj shtataj institucioj de Ekvadoro ignoras la protekton kaj ĵhus vendis tiujn teritoriojn (3 milionoj hektaroj) al la nafto-industrio.

Bonvolu subteni la peticion, respekti la rajtojn de tiuj indighenoj, flanke de Regenwald.org

<http://www.regenwald.org/aktion/918/ecuadors-isoliert-lebende-indianer-brauchen-schutz?mt=1625&v=0&ref=nl>

2013-07 **Atentigo eviti la radiadon de portebaj telefonoj, k.s..**

La Viena Kuracista-Chambro publikigis afishon en 12 lingvoj, inter ili Esperanto - sed supozeble (lingve) estas nur konceptajho.

<http://www2.aekwien.at/dlcentre/>

iom poste trovebla sub (de, eo) <http://www.verduloj.org/dokument.htm>

2013-07-05 **Roundup de Monsanto eniras la homojn - kaj eliras; sed intertempe ?**

La pesticido Roundup (Glyphosat) kontraŭ trudherboj en agrikulturo estis trovita en la urino de homoj en multaj europaj landoj. Ghi blokas enzimon en plantoj kiu respondecas por la sintezo da proteinoj.

Estas pruvoj ke ghi malbone efikas ankaŭ al cheloj de embrioj kaj placentoj de homoj kaj aliaj bestoj.

Jen ligo al la informo de la germana flanko de la amikoj de la Tero (angle):

http://www.bund.net/fileadmin/bundnet/pdfs/gentechnik/130618_bund_gentechnik_foe_e_glyphosate_briefings.pdf

(germane):

http://www.bund.net/themen_und_projekte/gentechnik/risiken/gesundheit/glyphosat/

2013-07-04 **REACH - la EU-programo por redukti la kemiajn minacojn pli-ampleksigas.**

Intertempe estas 12 000 plej dangheraj kemiaĵoj en la listo de REACH. La listo donas informojn ankaŭ al la normalaj civitanoj.

Novaj kandidatoj estas:

PFOA (per-fluoro-oktanacido, mi jam skribis pri tiu helpenzo por impregni teksaĵojn kontraŭ akvo kaj grasajhoj. Ghi estas persistenda (daurega), kaj agas kiel kseno-hormono (fremda hormono).

Nonil-fenol-etoksilatoj, el kiu metabolighas nonil-fenolo, kiu damaghas la idogenerecon je fishoj.

Dipentil-ftalato, danghera kiel la plej multaj ftalatoj uzata ofte kiel moligenzo.

Kadmio kaj kadmio-oksido.

<http://www.reach-info.de/>

<http://www.umweltbundesamt.de/>

2013-04 **Kemiaj drogoj - atentu - rampanta mortigulo**

Crystal Meth (meth-amphetamin) estas facile produktebla (kaj produktata ekz-e en Chehio). Dank al la EU & Schengen ne plu ekzistas fortaj limoj en tuta Europo. Tiu kemia drogo estis uzita jam en la Dua Mondmilito por aviadilo-batalantoj, kiuj forestis dum longa tempo sen paŭzo. Nuntempe junuloj kiuj intencas danci tut-nokte uzas ghin.

Sed ghi mal-konstruas aksonoj (ligoj inter nervoj), kiu detruadas la cerbon kaj personecon: (Iau Sina Gesell, Bad. Ztg. 2013-04-12, p.3)

2013-04 **Malto freŝdate ŝanĝis la kondiĉojn, per kiuj ĉasistoj povas akiri permesilon** por printempe ĉasi turtojn kaj koturnojn per escepto pri la Birda Direktivo. Inter la ŝanĝitaj kondiĉoj estis forigo de kontribuo de 50 eŭroj por permesilo kaj la postulo, ke la registritaj ĉasistoj surkampe surhavu brakbendon por identigi sin. La rezulto estis, ke pli ol 9500 ĉasistoj registriĝis por la printempa ĉassezono de 2013, kompare kun 6000 en 2012.

La rezulta plimultiĝo de registritaj ĉasistoj estigis devigon al la malta registaro kontroli la ĉassezonon per proksimume 66 policistoj dum la ĉashoroj. La kontribuo de la polico taskita de tiu respondeco, ALE (Administrative Law Enforcement), nombras nur 18 oficistojn. Por serioza apliko de la printempa escepto, tiu estu severe kontrolata. La forigo de la permesila kontribuo kaj brakbendo, same kiel la evidenta manko de disponebla obeiga kadro en ALE, klare pruvas, ke Malto malrespektis la regulojn, kiuj akompanas la ĝustan aplikon de escepto de la Birda Direktivo por ebligi printempan ĉasadon en 2012. Estas neniu indiko, ke la malta registaro intencas mem pritrakti la situacion, alie ĝi nuligintus la ĉassezonon, ĝis la policaj problemoj estos solvitaj. Kiel konsekvenco de ĉi tio, la Eŭropa Komisiono estas devigata senprokraste nuligi la escepton kaj tiel nuligi la printempan ĉasadon en la malta insuloj.

En 2012 BirdLife Malta ricevis 101 pafe vunditajn aŭ mortintajn birdojn, preskaŭ ĉiujn el protektitaj specioj, de griza ardeo ĝis hirundo, kaj la plimulto de la rabobirdoj, kiuj superflugas, estis celitaj. Ĉi tio estas la plej alta nombro ekde 2008 kaj indikas plimalboniĝantan situacion. BirdLife Malta klare ricevas nur tre limigitan nombron el ĉiuj kontraŭleĝe pafitaj birdoj. Ankaŭ kaptado okazas amase. BirdLife Malta ĵus entreprenis ioman kontrollaboron kaj trovis multajn pruvojn de neleĝaj kaptadoj de fringoj en diversaj lokoj tra la tuta insulo. Ĉasistoj uzas neleĝajn logilojn kaj ĉiajn ilojn por kapti birdojn. Unu el la kialoj, pro kiuj la situacio plimalboniĝas, sendube estas la interkonsento farita de ĉasistoj kun la Laborista Partio antaŭ la elekto. Ili eĉ diris, ke ili trovos manieron por esceptigi fringokaptadon, tial la situacio pli malboniĝas.

(tradukita de Leo De Cooman)

www.avaaz.org/en/petition/Stop_illegal_hunting_and_trapping_of_protected_migratory_birds_in_Malta

2013-05 Jen informo pri la tro **malrapida reago de EU-politikistoj rilate la klimato-shanghigon.**

Artikolo de Davydd, meze en „La Ondo“ - sub la kategorio „Vide el Bruselo“ kaj tie vi ankaŭ trovas alian gravan artikolon:

Katalunoj volas sendependecon - ene de Europa Unio

<http://www.esperanto.org/Ondo/Ondo/221-lode.htm#221-03>

2013-03 **Longa vintro en norda Europo - chu sekvo de la forceja efiko ?**

Certe vi legis pri amasoj da negho en la meza kaj norda parto de Europo. Kaj eble vi opinias, ke tio kontraŭdiras al la tutmonda klimata varmigho. Fakte ghi estas sekvo de tio.

Se vi rigardas la situon de Francio ktp, vi vidas ke ghi trovighas sur la sama largheco kiel la suda Kanado.

Kutime la varma aero super la Atlantiko premighis norden, sed nun la pli „varma“ aero

en la nord-polusa regiono premighas pli suden, kaj tiel pli longa atingas nin. (certe tro koncize raportita)

Oni ankoraŭ ne scias, ĉu tio shanghos nian mildan klimaton al pli severa.

(Iau Richard Rother, taz, 2013-03-27, p. 3, kaj Vladimir Petoukhov, Potsdam Instituto pri Klimato-esploro)

Komento de AVE/mw: Fine de Majo ghis mezo de Junio okazis grandaj inundoj en orienta Germanio - ĉefe je la Danubo kaj la Elbo, kiuj montris ne-vidatajn nivelojn - pro longdaŭra pluvado.

2013-01-08: **Klimata krizo en "Studio"**

"Studio" prezentas hodiaŭ 3-partan programon pri la urĝeco de la **klimata krizo** kaj pri la efikoj de klimata ŝanĝiĝo. Klaku "cc" (subtekstoj) por la lasta parto de la programo.

<http://novajhoj.weebly.com/index.html>

Bonan spektadon, Radioleo

Komento de AVE/mw: vi bezonas sufiche fortan komputilon por ghui tiun programon

Maro, Marbordaj Regionoj, Riveroj, Lagoj

2013-09-10 **Irano** sur pli bona vojo - subteno ankau por la **Lago Urumia**

La nova prezidento de Irano, Rohani, decidis ĉesi la konstruon da akvo-bariloj je tiu iam granda lago en la nord-okcidenta regiono, kiu finfine estus kauxinte ekologian katastrofon kaj por la migrantaj birdoj kaj por la ĉiurkauajho pro sano-minacantaj salohavaj ventoj. Oni ankau esperas ke li re-liberigos la malliberigitajn homojn, kiuj protestis kontraŭ tia ekologia peko.

(Iau aktuala informo de Fatemeh)

2013-04-06 Bonvolu subteni la **proteston kontraŭ planita granda bardigo Barro Blanco je la rivero Tabasara en Panamo**, kiu detruos la vivbazan terenon de la etno Ngaebe-Bugle - kiu ne estis pridemandita pri tiu projekto. Ili protestis estis perforte malebligita. La retejo „Internaciaj Riveroj“ estas en la jenaj lingvoj: angla,

china, hispana, portugala)

<http://www.internationalrivers.org/resources/stand-with-the-ng%C3%A4be-bugle-people-of-panama-7913>

2013-06-22 **Usono re-naturigas plurajn riverojn** mal-konstruante bar-digojn.

Ĉiu bar-digo, aparte la grandegaj, baras la vojon por la fiŝoj, ghenas la akvofluan kaj ligitajn fenomenojn. Pro tio estas laudinde, ke Usono detruas plurajn/multajn bar-digojn.

(en) <http://www.internationalrivers.org/resources/us-dam-removal-season-off-to-a-good-start-8010>

2013-03 **Internaciaj Riveregoj devas esti protektitaj pli bone.**

Ili eltrovis ke la postulita „empiria kolekto pri ekologia influo“ de iu teknika agado (konstruado da barajho, au fortigo de la bordo je iu rivero (angle „Environmental Impact Assessment“) fakte ne protektas la naturmedian biosferon - kaj tial ili proponas alian proceduron:

(lingvoj: cn, en, es, pt) <http://www.internationalrivers.org/world-rivers-review/world-rivers-review-%E2%80%93-march-2013-focus-on-environmental-impact-assessments>

2013-03 Nia kataluna eurodeputito Raül Romeva (Frakcio Verduloj / Regionalistoj / Piratoj) daure zorgas pri **daŭripova fiŝkaptado** - en diversaj lingvoj (oranghaj klaklokoj en la dekstra parto) - dank' al Ramon:

<http://blocs.mesvilaweb.cat/node/view/id/240443>

2013-02: jam la dua fojo **mortis giganta kvanto da haringoj en la malgranda Islanda Kolgrafa-Fjordo.**

Oni supozas, ke granda beton-ponto estis stabiligita pere de amaso da grundo - kun la sekvo ke la akvo-dinamiko ne plu estas la sama. La kvanto (50 000 t) atingis la tutjaran kolekton de la islanda fishkaptistaro. Jen la raporto en la germana: www.tagesschau.de/heringssterben-island100.html

Komento AVE/mw: oni planas tre grandan ponton en la Balta Maro. Kaj tie estis diskuto chu la dinamiko de la akvo-fluo eble estus ghenata. Fakte jam nun la Balta Maro suferas je manko da oksigeno, pro la altkvalitaj elfluoj el agrikulturaj kampoj kaj aliaj mastrumaj akvoj. La homaro devas esti pli atentema.

Agrikulturo, Arbaroj

2013-11-07 **EU-Komisiono akceptis GMO-maizon „Smartstax“**, kaj emas akcepti „1507“

Smartstax produktas 6 diversajn insekticidoj kaj estas rezistenta kontraŭ la herbicidoj glifosato kaj glufosinato. Ghi estis akceptita kiel nutrajho kaj furagho, malgrau tio, ke mankas toksikologiaj studoj.

En Decembro okazos la voĉdono pri GMO-maizo 1507 de la firmao Pioneer flanke de la membro-shtatoj. Ĉar la komisiono proponis la akcepton, necesas kvalifikita plimulto por malhelpi la kultivadon da 1507 en de EU ek de 2014.

(de) <http://umweltinstitut.org/gentechnik/allgemeines-gentechnik/allgemeines-gentechnik-174.html>

(ghenerala informo ankau en la angla)

2013-11-07 **Sierra Leone (Afriko) - krime: oleopalmoj anstataŭ pluvarbaro**

La krimon faras la homoj kiuj protestas kontraŭ plia detruo de la pluvarbaro.

La belga-luksemburg firmao SocFin (de Hubert Fabri) kaj franca Bolloré (Vincent Bolloré) ĵhus kultivas 65 kvkm kaj sekvas 50 pliaj kvadrataj kilometroj. Homoj estas forpushitaj el sia vivtereno, kaj protestantoj jhetataj en la malliberejon.

Bonvolu subteni la proteston de la organizo por savi la pluvarbarojn:

(en la germana) <http://www.regenwald.org/aktion/930/sierra-leone-fuer-palmoel-protest-in-den-knast?mt=1713&v=0&ref=nl>

2013-11 **Ruando vivas sen plastaj saketoj - Gratulon !**

Ankau Tanzanio kaj Kenio klopodas, sed evidente en Ruando oni kune kun la civitanoj agadas por elimini la plastan rubajhon en la ĉirkauajho.

Mi rememoras ke ankau Senegalo aktivas por purigi la maron kaj rearbarigi la marbordon.

(de) <http://www.tagesschau.de/ausland/ruanda156.html>

2013-11-05 la **10 plej malsanaj lokoj** sur la planedo Tero - de la Verda Kruco

Ili trovighas en Rusio (Norilsk, Dzerzhinsk, Chernobilo), Indonezio, Nigero, Bangladesho; ili ne estas solaj - mi pensas pri Fukushima, ...

La Verda Kruco estis fondita de Mikaelo Gorbachev: Por Paca kaj Dauropov(ec)a Mondo <http://www.greencrossinternational.net/>

2013-09 **Semi komune por la estonteco:**

Jen ligo al internacia ret-pagharo kie temas pri ekologia kaj antropozofia agrikulturo; la interesa punkto estas, ke oni instigas civitanojn kune semi kaj sekvi la kreskadon de la gren-herboj. La komenca retejo donas ligojn al multaj landoj:

<http://www.avenirseem.ch>

2013-04 **Sojo-monokulturoj venenigas** la homojn pere de shprucado de pesticidoj - ankau de ne-permesitaj. Koruptaj politikistoj akceptas la agadon de multnaciaj konzernoj (Cargill, ADM). Monokulturo ne povas nutri la homojn; ili produktas por la viando-fabrikoj de industriaj landoj.

Feliche ekzistas homoj subtenataj de (kelkaj) religiaj parohoj kiuj kontraustaras tian dangheran evoluon, kaj subtenas varian ekologian agrikulturon.
(Iau Sandra Weiss, Bad.Ztg. 2013-04-17, p. 3)

2013-05-02 **Konzernoj rebatas per akuzoj - b-vu subteni Andy Hall:**

La 22-an de februaro 2013 la Brita aktivulo s-ro Andy Hall estis informata, ke civilaj kaj kriminalaj akuzoj estis formulitaj kontraŭ lin; tio surbaze de plendoj fare de Thai fruit processor, **Natural Fruit** Company Ltd. Andy Hall kontribuis al raporto, kiu montru kelkajn jurajn malobeojn kontraŭ migrantaj laboristoj, inter alie infanlaboro. Natural Fruit rifuzis renkontiĝi kun la esploristoj aŭ klarigi iliajn ekkonojn. Andy Hall estas akuzita kalumnii la reputacion de Natural Fruit's kaj "publikigi falsajn asertojn al komunikilaro".

Se kondamnita, Andy Hall estas konfrontita kun monpuno de 7,7 milionoj da Eŭroj kaj arestpuno de 7 jaroj. Ni postulas, ke Natural Fruit chesigu siajn malicajn kaj agresivajn akuzojn kontraŭ Andy Hall kaj ke la Tajlanda registaro ebligu esploron pri la Natural Fruit-agado per sendependaj institucioj.

(bonvolu subteni - jen teksto en Eo)

http://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=1773

Esperanto pagharo de la internacia sindikata retejo - labourstart:

<http://www.labourstart.org/2013/index.php?langcode=eo>

2013-04 **Papilioj ne nur estas belaj ...**

Ili ankau monitoras la kvaliton de nia chirkauajho; tamen estas endangherigataj. En la lasta jaro mi vidis multajn diversajn chirkau la kasteleto Grezijono en orienta Francio, kie trovighas granda vere herbejo (ne nur gresejo). Samtempe en Germanio mi vidis tre malmultajn - multe malpli ol kutime. La naturamikoj informis pri la kondiĉoj kiujn bezonas papilio dum sia longa kaj malfacila vivo. Ghi dauras tre longe: de la ovo, raupo, larvo ghis finfine aperas la papilio povas esti pli ol unu jaro. Intertempe ghi bezonas ofte tre apartajn plantojn, sed ne bezonas homojn kiuj estas ordemuloj, kiuj shatas gazonon.

Do, se vi havas ghardeneton au via urbo havas kelkajn verdajn areojn instigu vin mem kaj aliajn respekti ankau la viv-bezonojn de papilioj.

Jen pagharo kiu montras dek belajn papiliojn, pri kiuj la BUND (naturprotekta ligo) petas nin (en Germanio) fari statistikan informon. Ili montras la nomon se vi montras al la bildo - por trovi la nomon en via lingvo, bonvolu uzi paralele Wikipedion):

http://www.bund.net/themen_und_projekte/abenteuer_faltertage/faltertage_2013/

2013-04: **GMO-Bakterioj por chevaloj kaj ni ?**

nederlanda firmao por besto-medikamentoj la unuan fojon vakcinis chevalo-bebojn per genetike modifitaj bakterioj, por ke tiuj ne malsanighu je pulmonito. char temas pri vivantaj bakterioj restas la risko, ke ankau homoj (beboj kaj malsanuloj) estos trafitaj. La Umweltinstitut (naturmedia instituto) en Munkeno opinias, ke tiu risko ne estis juste esplorita. Je tia amasa tenado da 4000 chevaloj en tiu chevalejo, povas okazi pli facile la malsano pneumonito. Je specio-justa tenado tiu malsano kutime ne okazas. Vi povas legi la detalojn kaj protesti tie:

<http://umweltinstitut.org/gen-lebend-impfstoff>

2013-03 **Pesticidoj minacas la fekundecon de homoj.**

Ghardenistoj kiuj intense uzas pesticidojn pli ofte havas problemojn rilate sia fekundeco, pro la agado de kelkaj pesticidoj. Ni remeoru la libron „La Mallauta Printempo“ de Rachel Carson, kie DDT haltigis la naskighon/elkovighon da birdoj. La organizo PAN (peticide action network) postulas pli zorgeman kontrolon da pesticidoj antau ilia uzad-permeso.

Jen la internacia retejo - kun ligoj tutmondaj: <http://www.pan-international.org>

(Iau Wolfgang Loehr, taz, 2013-03-21, p.8)

2013-03 **Europaj agroj ighos pli naturaj - chu vere ?**

La subtenoj de EU por la kamparanoj kaj agrikulturistoj ricevos pli verdan karakteron, ĉar nun ekologio estos enkludata en la regularon - (parte efika nur ek de 2016 !). Ekze postulas pli diversajn plantojn, ankaŭ florantajn kaj malpli kultivitajn zonojn. (laŭ Jost Maurin, taz, 2013-03-21, p. 8)

2013-04 **Monsanto - celas alpreni la monopolon por nutrajho-produktado.**

Ni civitanoj klopodu bari tian estontecon. Chifoje AVAAZ petas malgrandan monon por financi tiun agadon. Se vi havas la eblecon (kreditkarto,...) bonvolu subteni ilin. (16 lingvoj): https://secure.avaaz.org/en/stop_monsanto_rend3/?bGgALab&v=24379

2013-04 Europa Patent-Traktato - **Monsanto & Co eluzas truojn en la legho por akiri patentojn:**

La peticio celas al la Administrativa Konsilio de la Europa Patento-Organizajho, ke ili fermu la glit-truojn de la legho, kiuj ebligas al grandaj firmaoj patentigi plantajn variecachaĵojn kaj kutimajn metodojn por plibonigi plantojn. Necesas klaraj limoj kaj malpermesoj por protekti la kamparanojn kaj bredistojn, kaj ankaŭ nin konsumantojn, kontraŭ la akaparo da nia nutrajho-ĉeno de konzernoj.

Bonvolu subteni la peticion organizita de AVAAZ: (multaj lingvoj)

http://www.avaaz.org/en/monsanto_vs_mother_earth_x/?bGgALab&v=23931

Krom tio Monsanto (ktp) ighis ĉi-momente preskaŭ ne-atakebla en Usono. Obama ĵus subskribis la mastrumo-leghon, kiu enhavas aldonon 735.

Tiu signifas, ke ĵughejoj ne plu rajtas akcepti la postulojn haltigi la el-semadon da GMO-semoj; se la agrikultura ministro akceptis tion. Tiun aldonon instigis senatoro Roy Blunt, Missouri; tie trovighas Monsanto kaj ankaŭ multaj kamparanoj. Li ricevis plurfoje monon de la Monsanto.

La asocio „Food Democracy Now“ protestas kontraŭ tiu aldono. La mastrumo-legho validas nur ĝis la somero; kaj la protestantoj agadas, ke nova legho ne enhavu tiun (aŭ similan) ne-atakeblan permeson, ĉar tiu kontraŭas la demokratian principon de dispartigitaj povoj.

(laŭ Dorothea Hahn, taz, 2013-04-03, p. 09)

2013-02: 20 Jaroj da komerca kultivado de t.n. **Verda GMO** en Usono.

Vidu kio sekvis el la promesoj de Monsanto & Co - raporto de alternativa GMO-specialisto Christoph Then

laŭ peto de Martin Haeusling, MEP (Verdulejoj/ELA/PP), kiu prilaboras la agrikulturajn temojn. (en la germana, eble ankaŭ en aliaj lingvoj)

[http://www.martin-](http://www.martin-haeusling.eu/downloads/Broschuere_Gentechnik_Web%20160113.pdf)

[haeusling.eu/downloads/Broschuere_Gentechnik_Web%20160113.pdf](http://www.martin-haeusling.eu/downloads/Broschuere_Gentechnik_Web%20160113.pdf)

2013: Jaro de **Kinuo** (kvinoo (PIV)) - **greno de inkaoj por hodiaŭa uzo**

Ĝi estas esperplena greno el la tempoj de inkaoj, inda je pli vasta konateco kaj uzado. Por puŝi ĝin al niaj okuloj, la monda organizaĵo por nutrado FAO deklaris la jaron 2013 "Jaro de Kinuo" - kaj petas la tutmondan socion aktive partopreni en la informado pri la esperplena planto el Andoj.

La **Esperanto-grupo** de la kulturligo "**Prenzlauer Berg**" en Berlino en fino de januaro per publika prezento malfermis la kinuo-jaron 2013. La partoprenantoj povis vidi mallongan filmeton, kondukintan al la regionoj de Andoj, oni informis pri la pseŭdogreno kinuo, ĝia rikolto per kooperativanoj kaj ĝia utiligo kiel altvalora nutraĵo. En la unua rondo de gustumado estis ofertita kinuo en la spica versio, kiu estis volonte kaj laŭde akceptata!

Per prezento kun grafikaĵoj kaj fotoj Roland Schnell informis pli detale pri la historio kaj la estonto de kinuo. En la fino de la kunveno la partoprenantoj frandis dolĉan version, kovrita per malhela kaj blanka ĉokolado. Estis multaj demandoj pri kuirteknikoj kaj pladoj, ja kuirlibroj ekzistas en diversaj naciaj lingvoj, sed ne ankoraŭ en Esperanto. La ĉeestantoj bonvenigis la proponon en printempo ornami la Zamenhof-parkon en

Berlin-Lichtenberg per simbola plantado de kinuo.

Preleg-skemo de la prezento en SWF-formato:

- <http://www.stiftung-europaverstaendigung.de/Prelego.swf>

Pri la rilatoj inter Esperanto kaj kinuo estas blogero ĉe:

- <http://www.ipernity.com/blog/porkido/436580>

2013-01-31 **GMO-terpomoj ne kreskos en Europo**

Dank al plurflankaj informoj pri la riskoj kaj civilsociaj klopodoj la produktado da genetike modifitaj terpomoj. La germana kemio-konzerno BASF finfine cedis la esploron kaj kultivadon.

(Iau informo de la Umweltinstitut Muenchen: <http://www.umweltinstitut.org>)

2013-01: **EU-Komisiono pri agrikulturo demandas nin - la civitanojn:**

Temas pri aktualigo de la EU-politiko pri agrikulturo: la civitanoj rajtas diri kion ili pensas kaj volas por la futuro.

Sur la AVE-retejo vi trovos plurajn artikolojn pri agrikulturo: GMO, grundo, antibiotikoj <http://www.verduloj.org/dokument.htm> vidu > edukado, ekologio..

Restas la temo brutobredado, kaj -tenado:

Multaj AVE-anoj estas vegetaranoj, aliaj manghas viandon malofte, tial por ni klaras:

- ni postulas ne varbi por viando-konsumo

- bestoj devas vivi deĉe, havis sufiche da spaco, aero, povas eliri al herbejoj

- antibiotikoj en la besto-nutrajho estu malpermesata

- herbejoj (por bovinoj) havu ne nur gresojn sed ankaŭ florantajn herbojn

- la agrikulturo lasu sufiche da spaco je kampo-randoj, kaj reton da naturzonoj por sovaghaj bestoj

- GMO ne rajtas kunekzisti kun la normala biologio - fakte planta GMO estas tro riska

Informon kaj demandilon vi trovos sur la retejo en la oficialaj EU-lingvoj;

oni preferas ke vi uzos la anglan (fakte ni rajtas uzi niajn naciajn lingvojn, kiuj estas oficialaj en la EU).

http://ec.europa.eu/agriculture/consultations/organic/2013_de.htm

La pridemando dauros ĝis la 10a de Aprilo ! (dankon Anne, por tiu informo)

2013-05-22 **Aceh/Indonezio permesas pra-arbar-forhakadon por minadoj kaj oleo-palmoj.**

Denove oni formetas la viv-bazon de hom-similaj simioj, elefantoj kaj tigroj, ĉar ankaŭ protektataj terenoj estas trafitaj. La prezidento povus malhelpi la planojn.

(ĝis nun eble nur en la germana - serĉu „Aceh“) <http://www.regenwald.org>

2013-04-13 **Orang-Utang kaj aliaj animaloj estis senhejmigitaj pro palm-oleo.**

EU rigardas ...

La firmao Bunitama Gunajaya Agro (BGA) sur la insulo Borneo faligas grandskale la praarbaron.

Nekredeble - tiu firmao estas membro je la siglo RSPO, cele al daurigebla produktado de palmoleo. Ĝi eksportas la oleon al Europo, ekz-e pere de IOI (Malajzio), al kiu apartenas triono de BGA kaj oleo-rafinejo en Roterdamo (Loders Crocklaan). RSPO estas akceptita de EU, sed evidente ne vere kontrolas !

Bonvolu subskribi:

(diversaj lingvoj - Bonvolu eventuale serĉi „Borneo“ - eble tiu peticio estas ankoraŭ ne tradukita; en tiu kazo vi certe trovas multajn aliajn simile gravajn):

<http://www.regenwald.org/aktion/914/sterben-fuer-palmoel-nein-danke?mt=1568&v=0&ref=nl>

2013-02-03 **Peticio, ke Malajzio respektu la pluvarbarojn,** kaj ne venenigu

Borneo-elefantojn por havi pli da palmoleo. Kaj ankaŭ lasi viv-terenon por la elefantoj, simioj k.a. bestoj.

Respondecas la ĉefministro Musa Aman de la provinco Sabah (Borneo) kiu ofertas pli kaj pli da koncesioj kultivi oleopalmojn en la pluvarbara regiono.

Bonvolu subteni la peticion en la jenaj lingvoj (de, en, es, fr, pt):

Alternativaj Energioj & Efiĉeco

2013-10-06 **Hispanio tremas pro tergaso**

Giganta projekto krei rezervon da tergaso subgrunde en la maro antaŭ Katalunio evidente kaŭzis serion da ter-tremoj.

Juan Lopez de Uralde, de la verda partio EQUO, postulas malŝalti la 2 proksimajn atomreaktorojn, por eviti katastrofon kiel en Fukushima.

(Iau R. Wandler, Bad. Ztg. , 2013-10-07)

2013-08-18 **Verduloj postulas de la EU-Komisiono novan energio-politikon:**

- Haltigu la subtenadon da atomenergio.
- Ne plu ŝtata garantio (mono) por konstruado da atomreaktoroj.
- Komuna kolekto de la rezervoj (por atomreaktoroj) en fonduso por malkonstruo kaj sekura „eterna“ stokado da alt-radiantaj rubaĵoj.
- Asekuro por atomreaktoroj kiuj portas la veran riskon. Ĉar nuntempe la pago kaze de akcidento de atom-firmaoj estas limigita (al 500 milionoj EUR en Germanio, al 1 mrd maksimume en Eŭropo). Vi povas kompari, ke la katastrofo de Fukushima kostas pli ol 100 miljarde EUR.
- Malvalidigi la EURATOM-kontrakton, kiu estas parto de la Lisabona „Konstitucio“ de EU. Ĝi devenas el la 50-aj jaroj, kaj postulas subtenon favore al atomenergio.
- Krei novan kontrakton kiu favoras energio-efiĉecon kaj - ŝparadon; kaj krome la renovigeblajn energiojn.
- Plirapidigi la konstruon da renovigeblaj energiofontoj, kiuj estas ekologie kaj ekonomie senco-havaj.

2013-07 **EU-komisaro Oettinger postulas ke la EU daurigu la subtenon por la atomenergio.**

Ni postulas fini la EURATOM-traktaton el la jaro 1950, kaj krei Energio-traktaton, kiu entenas chiujn riskojn kaj problemojn de energio-produktado kaj konsumado. Fakte la Verdaj Partioj postulis ne aneksi la EURATOM-traktaton al la nuna Lisabona-Traktato, kiu estas la nuna bazo de EU.

(letero nur en la germana) <http://umweltinstitut.org/radioaktivitat/aktionen/kein-steuergeld-fur-atomkraft-986.html>

2013-07-16 **Kanado: Nafto-Trajna katastrofo** pro ne sufiĉe severaj reguloj

La 6a de julio, okazis la plej grava trajna katastrofo en la historio de Kanado. Almenaŭ 50 homoj mortis kaj kompleta urba kvartalo detruighis pro nafta vagonaro kiu eksplodis meznokte centre de la urbo. La kanada registro estas pro nafto, pro rapida esplorado de nafto. Ĝi malfortigis la leghojn kiuj protektas la ekologion por povi pli rapide evoluigi la naftan produktaton kaj plachi al nafta industrio. Kiam oni produktas pli, necesas transporti pli. La kanada registaro permesas ke nafta trajno estu sen kontrolo kiam la pilota teamo ŝanĝighas. Vagonaro restis tiel sen kontrolo dum kelkaj horoj kaj ĝi komencis movighi pro deklivo. Ĝi atingis grandegan rapidecon, estante sen piloto kaj frakasighis meze de 6 mil homa urbeto. Bonŝance ke nur kelkaj vagonoj eksplodis el la 76. Tamen la nafto fluadis al apuda lago, rivero sen paroli pri keloj de domoj en urbe. Nun oni multe diskutas ke reguloj pri transporto de nafto devus esti pli severaj kun konstanta kontrolo.

(en Esperanto de Normand Fleury, Montrealo)

Ĉar tiuj nafto-fontoj produktos nur dum kelkaj jaroj, oni ne investas en nafto-dukoj, sed uzas trajnojn. Evidente la materialo estas malnova kaj ne sufiĉe sekura.

Alia temo estas la „Fracking“ (frakasada maniero ekspluati ne-moveblan nafton kaj tergason), pri kiu mi jam skribis, ĉar tiu minacas la medion kaj la trinkakvon pere de kemia „koktelo“.

(Iau Jörg Michel, taz, 2013-07-16, p. 9)

2013-03-08 **Nova Energio - Rusio** komencas evolui regajneblan energion germanlingva jurnalo kun reduktita anglalingva versio en la reto, prezentas aktuale la situacion en Rusio kaj la leghoproponon pri la Subteno por la Regajneblaj Energioj.

Malgrau tio, ke Rusio havas „senfinajn“ fosiliajn energiojn, ekzistas lokoj kiuj estas tro for de la kurento-reto, kaj tie ekonomie indas komenci uzi vento- kaj suno-energion.

Chi-jare Rusio estas la partnera lando por la granda teknologia foiro Hannover Messe:

(ru) <http://www.rawi.ru>

(de, en) <http://www.neueenergie.net>

2013 **e-automobiloj** - diskuto: chu elektrikaj autoj povas stabiligi la kurento-reton.
<http://www.klimaretter.info/mobilitaet/hintergrund/12862-viel-heisse-luft-um-e-autos>

2013-03-01 **Ekspozicio pri alternativaj energioj kaj energio-efika agado** en Freiburg/Breisgau (DE):

Ghi estas tre inormricha kaj videbla ankau sur la retejo de Ecotrinova - ch. dudeko da afishoj, kies teksto estas en la germana; krom la informo pri du suno-inineroj inter Alsaco kaj suda Badeno, kiu bazighas sur du-lingva broshuro.

<http://ecotrinova.de/pages/ausstellung-ecovalley.php>

Atomenergio ktp

2013-10-22 **Fukushimo kaj la pluvo**

La giganta kvanto da akvo kiun oni daure bezonas por malvarmigi la radioaktivan fuelstangojn kaj fandajhon kuzas problemojn - al tiu venas pluvegoj. Fakte oni devas vershi radioaktivan akvon en la maron; au ghi memstare fluas tien.

(AVE/mw, lau diversaj aktualaj informoj - detaloj sekvos iam)

2013-07-11 **Fukushima-reaktoroj poluas la grundakvon ankau per Cezio:**

Chifoje oni mezuris valoron da Cezio 134 kaj 137 pluroble pli alta ol akceptata en la grundakvo tuj apud la reaktoroj en Fukushima kaj je la rando de la maro, supozeble kun eligo en la maron. Oni ne scias kial. Sed mezuris.

TEPCO ne povas masrumi la gigantajn kvantojn da akvo kiuj estis kaj estas bezonataj por malvarmumi la ancorau tri aktivajn reaktor-„kernojn“, kiuj fandighis kaj trovighas ie sur la planko au ene de la betona planko.

Samtempe venis la informo ke Masao Yoshida, direktoro de Fukusima-reaktoraro mortis 58-jara je kancero de la mangho-tubo - supozeble ne pro la akcidento. Li estas rigardata heroo, char li ordonis daurigon da pumpado per mara akvo en la reaktorojn, kontrau la ordono de TEPCO. Supozeble tiamaniere li helpis eviti eksplodon de la fandajho(j).

(lau Angela Koehler, Bad.Ztg. 2013-07-11, p.10)

2013-10-9 **EU rezignas je atom-subsenciado** - nia protesto estis efika !

Mi petis je la 18-a de Augusto protesti kontrau la ideo de EU, subteni atomenergion.

Kaj nun venis la informo, ke la nova EU-subteno-regularo enhavos nek malnovan nek novan atomenergion. La (germana) komisaro pri energio, Oettinger, ancorau subtenas atomenergion - kontraue al la kancelierino Merkel.

(de, koncize en la angla)

http://umweltinstitut.org/radioaktivitat/aktionen/hintergrund_eu_atomsubvention_steuergeld-989.html

2013-07-24 **Fukushima & Tiroida glando je infanoj:**

en la regiono chirkau Fukushima estis esploritaj 175 499 infanoj sub-18-jaraj. Je 43% oni rovis nodoj au cistoj kiuj ne estas dangheraj je plenkreskuloj - sed je junuloj. 1000 infanoj estas esplorataj duan fojon, kaj oni je la unua duono oni jam trovis kancero-suspekton je 28 infanoj, fakte je 13 oni elprenis kanceran tiroidon, je 1 infano la elprenita glando ne portis kanceron.

Lau IPPNW.org la trovitaj kreskajhoj en la kompleta populacio estas pli ol dek-obla ol kutime. (de)
<http://www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Der+Tod+des+Helden+von+Fukushima,6,a26016.html>

2013-06-13 La EU-Komisiono postulas, ke **atomenergia sekureco** unuarange devas esti **pagebla** por la firmaoj - ni homoj - kaj la naturo - sekvas. Rebecca Harms, Verda EP-anino, informis pri tio:
<http://rebecca-harms.de/index.php/presse/oettingers-richtlinie-wird-nicht-fuer-mehr-sicherheit-in-e-14787>

2013-07-15 **Chinoj protestis kontraŭ uranio-plirichiga uzino**

en Jiangmen, suda P.R.Chinio.

La registaro pro tio haltigis la planojn - sed supozeble serchos alian lokon (?) Por la daŭre kreskanta ekonomio la lando bezonas chiam pli kaj pli da energio - la renovigeblaj estas forte subtenataj, sed ankoraŭ ankau la atomenergia. La vasta uzado da karbo por produkti kurenton - kaj hejtado kausas malsanojn kaj reduktas la vivodaŭron. (lau Felix Lee, taz, 2013-07-16, p. 8) kaj

2013-07-15 **Rusio intencas konstrui atomreaktoron en Finnlando,**

ĉar rezignis pli kaj pli da firmaoj, konstrui la planitan en Pyhäjoki (je la bordo de la Balta Maro). Ni ne volas tion.

(lau Reinhard Wolf, taz, 2013-07-15, p. 9)

2013-07 **Kio okazos, se la atom-reaktoro Fessenheim eksplodas ?**

En Fessenheim, Francio, Alsaco, Dreyeckland apud la Rejno-rivero trovighas la plej malnovaj 2 atomreaktoroj de Francio. La registaro de Hollande planas haltigi ghin, sed nur en 2016. Intertempe altighas la risko - ekzemple, ke aviadilo krashas sur ghin, au malnova tubo krevas - fendoj jam ekzistas. La nova plifortigo de la betona planko ne sufichos - kiel montras la fandighintaj reaktor-kernoj de Fukushima - kiuj eligas radioaktivajn substancojn en la grundakvon.

Sed por aktuala katastrofo unue gravas la eligantaj substancoj en la nuboj, kiuj povas sterni la materialon „fall-out“ en miloj da kvadrataj kilometroj - kiel pro Chernobil; Japanio estis „bonŝanca“, ĉar la plej granda nuboj estis blovita super la maron - kun grandskala distribuo, kio montrighas en fiŝoj ktp.

Se okazos simila katastrofo kiel tie - temas pri ghis 1 miliono da homoj kiuj devus fughi (depende de la aktuala vento-direkto).

Engaghitaj civitanoj nun demonstris en eta dimensio (per traktoroj), kio okazus, se cent-miloj da homoj klopodas fughi per automobiloj - kio pri trajnoj (?). Okazos katastrofaj shtopighoj.

Estas multaj demandoj ĉi-rilate. Ekz-e la jodo-tabloidoj trovighas en stokejoj, sed kiam(aniere) ili atingos la homojn ??

Jen la raporto pri la manifestacio - en la germana:

<http://www.badische-zeitung.de/kernkraftgegner-fordern-bessere-vorkehrungen-fuer-atom-unfaelle>

Kaj jen raporto pri la granda manifestacio en Frejburgo je la 15-a de Marto 2011, okaze de la atom-katastrofo de Fukushima - „Frejburgo ne havas planon por la Super-Gau“, GaU = plej granda pripensinda akcidento - ankau en la germana:

<http://www.badische-zeitung.de/freiburg/freiburg-hat-keinen-plan-fuer-den-super-gau--42656715.html>

2013-06-30 **Stroncio en la grundakvo ĉirkau Fukushima**

La kvanto estas 30-obla rilate la permesita limvaloro. Se Sr-90 eniras la organismon, aparte en la ostojn. Tie ghi povas kausi kanceron - aparte de la sango: leukemion

<http://www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Neue+Atomdebatte+in+Japan,6,a25789.html>

(el: <http://www.klimaretter.info/>)

Komento AVE/mw: Eble la stroncio venas el la grandega kvanto da akvo por

malvarmumigi la detruitajn atomreaktorojn de Fukushima. Sed ankaŭ eblas, ke la fandighita reaktor-kerno pro la ege alta temperaturo damaghis la tre dikan betonan fundamento-platon (7 m) kaj tiel poluis la grundakvon. Ni atendas detalojn.

2013-05 **Kargo-ŝipo kun UF6 brulis en Hamburgo / MOX-transportoj trans urboj**

Aparta minaco estis la proksmece de 500 m al granda sub-chiela kunveno de ch. 30.000 protestantaj kristanoj samtempe. La urba administracio ne informis la homojn, sed ankaŭ la ŝipo ne tuj informis la fajrobrigadistojn pri la danghero.

Sama minaco venas de transporto da MOX-brulajho por atomreaktoroj - en tiu kazo al Brokdorf trans Hamburg. MOX estas miksajho inter Uranio kaj Plutonio.

La aktivuloj de ".ausgestrahlt.de" petas subtenon por daurigi la inform-laboron.

<https://www.ausgestrahlt.de/mitmachen/mox/mox-spende>

(raporto de la polico) <http://www.ndr.de/regional/hamburg/schiffsbrand125.html>

2013-05 Jen **germanlingva video pri la minacoj fare de atomreaktoroj:**

eble indus traduki ghin en Esperanton.

(de) <http://www.ausgestrahlt.de/mitmachen/katastrophenschutz/video>

2013-02 **Kiom kostus Atom-katastrofo en Francio:**

Depende de la vento-direkto oni devus evakui 100 mil ghis unu miliono homojn.

Lau IRSN la kostoj estus inter 100 kaj 400 miljardoj; ekzemple ghi trafus la vendadon da vino au aliaj produktoj.

Japanio estis bonŝanca, ĉar la vento transportis plej grandan kvanton da radioaktivaj partikloj en la maron, sed tamen IRSN menciis kostojn de 200 miljardojn.

(de) <http://www.spiegel.de/wissenschaft/technik/irsn-studie-atomunfall-wuerde-frankreich-430-milliarden-euro-kosten-a-881940.html>

2013-04-20 **Radioaktivaj arbaroj en Japanio - kion fari ? ? ?**

La japana registaro pripensas kion fari rilate la radioaktive kontaminitajn arbarojn kaj forstojn, kiuj kovras plejparton de la regiono de Fukushima.

Formeti la grundon havus la sekvon de granda erozio, kaj minacus la arbojn.

<http://www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Radioaktive+Waelder+--+was+tun,6,a25226.html>

2013-04-24 Sendai, Japanio: la **alta jughkortumo de Sendai lasas infanojn sub radioaktiva poluado.**

En Junio 2011 postulis gepatroj kaj anti-atom-aktivistoj evakui la infanojn el la urbo Koryjama kiu trovighas 60 km okcidente de Fukushima (regiono, kie al-terenis la radioaktiva nuboj) havas 300 000 enloĝantojn. En Decembro la postulo estis rifuzita de la malalta jughkortumo, kaj nun ankaŭ la apelacio je la 24-a de Aprilo 2013 (post du jaroj !) la alta jughkortumo decidis kontraŭ oficiala evakuo - kun la cinika rimarko, ke jes estas radioaktiveco super la lim-valoron, sed la familioj mem povus elsendi la infanojn, je propraj kostoj, ktp..

Infanoj, kompare al plenkreskuloj, estas multe pli trafitaj de malalt-doza radioaktiveco, ĉar ilia korpo kreskas rapide. Oni ja spertis aparte en Belorusio, ke kelkaj jaroj post la Chernobila Katastrofo estas multaj infanoj, kies san-stato estas malalta kaj multaj havas leukemion (bonvolu vidi sube la artikolon pri alt-radioaktivaj aproj, 26 jaroj post Chernobilo kaj en distanco de 2000 km).

(lau informo de Mika K., tradukita el la angla: <http://bo.st/14gY5vs>, Boston (Globe) de Yuri Kageyama, AP)

<http://www.boston.com/news/world/asia/2013/04/25/japan-court-rejects-demand-evacuate-children/JXDTIYWtJFzUakZVyJGyRI/story.html>

2013-04 **Ankorau alt-radioaktivaj fungoj post Chernobilo poluas sovaghajn porkojn.**

En la suda parto de la Nigra Arbaro en suda Germanio ĉi-jare oni tre ofte monitoris

altan radioaktivecon en la viando de sovaghaj porkoj (aproj). La akceptata nivelo de 600 Bq/kg estis plialtigita ĝis 50%, tio signifas altigita risko, kaj malpermeso uzi ĝin. La viandon oni traktas kiel rubo.

La aproj en la pli longa vintro evidente manghis pli ol kutime la t.n. cervo-fungo (truflo ?), kiu kreskas sub la surfaco, kaj akumulas cezion, kies radioaktiva izotopo Cs-137 alvenis per radioaktiva nubo en la jaro 1986 eligita de la atomreaktora katastrofo de Chernobilo, kaj per pluvo alterenis post vojo de ch. 2000 km.

<http://www.badische-zeitung.de/wildschweinfleisch-im-kreis-emmendingen-ist-radioaktiv-verseucht>

2013-04 Uranio-esplorado & ekspluatado en centra Tanzanio malsanigas la homojn.

La regiono de Bahi, ch. 80 km okcidente de Dodoma ne havas elfluon, kaj estas tre fekunda tereno por agrikulturo, ekz-e por kultivi rizon. Tie nun okazas esploro por pli posta ekspluatado je uranio. La kampoj jam estiis poluigitaj pro la elfluantaj uraniaj (k.a.) mineraloj kaj kemiaĵoj. Multaj homoj jam malsanighis pro kauterizanta akvo, kaj ricevis aparte pro tio okulmalsanojn. Kaj tial fakte granda tereno estas ne plu uzebla por kultivado. Bedaurinde la registaro estas ne suficite atentema !

Civilsocia organizajho CESOPE informas la homojn kaj protestas.

Pli pri ili (en la angla) <http://cesopetz.blogspot.de/>

Informo de Uranium-network: <http://www.uranium-network.org/index.php/africalink/tanzania>

(aktivulo de CESOPE prelegos en Freiburg, kaj poste mi sendos pliajn detalojn.)

2013-03 en Japanio pliighas kancero

Post la atomkatastrofo en Fukushima 2011-03 multaj lokoj jam estis „purigitaj“, grandaj amasoj da radioaktiva grundo, polvo, vegetaĵoj, rubo esits kolektita kaj stokita en pluraj lokoj.

Bedaurinde la rekta sekvo por la sano ne estas tiom facile kashebbla. Lau WHO (Tutmonda Sano-Organizo) raportis ne nombrojn, sed ke ekzistas „iomete altigita kancero-probableco“.

IPPNW (kuracistoj kontraŭ la atom-milito) raportas nombrojn: en la gubernio Fukushima naskighis 15% malpli da vivantaj infanoj, sed ankaŭ en la tuta lando malpli; la infano-mortaleco estis altigita je 4% (statistikaj nombroj). En rektaj nombroj: 55.592 da junuloj en tiu gubernio malsanighis je la tiroida glando (cisto, la antaŭulo de kancero). Kaj pro radioaktiva nutraĵo okazos kanceroj en la tuta lando (prognozo: 37.000). (lau WHO, IPPNW kaj T.Zimmermann, taz, 2013-03-07, p.08)

Kaj ne forgesu kune manifestacii remore al la atom-katastrofo en Japanio "Fukushima" antaŭ 2 jaroj: <http://www.verdujoj.org/energio.htm>

2013-04-06 Protestu kontraŭ la planoj konstrui du pliajn atomreaktorojn en Paks, Hungario, kiu pli ol duobligus la povumon de la kvar tie ekzistantaj reaktoroj. Homoj en la najbaraj landoj (inkluzive Germanio) rajtas - ankaŭ formale - protesti lau medio-akorda esploro: (de) <http://umweltinstitut.org/radioaktivitat/aktionen/aktion-kein-akw-ausbau-in-ungarn-1107.html>

2013-03 Bulgara parlamento decidis halton je Belene, sed ...

Do, la referendumo instigis la parlamenton je granda plimulto (114/40) ne plu sekvi la plu-konstruadon de planita atom-reaktoro en Belene.

Marina Dragomiretzkaya, la gvidantino de la Verda Partio (Zelena Partija), kaj same Borislav Sandov (Zelenite) bedauris la malaltan partoprenon en la referendumo, kaj ili same protestis ke la parlamento decidis pli-longigi la vivo-dauron de la reaktoroj 5 & 6 en Kozloduy, kaj ech novan reaktoron tie.

Jen la retejoj de la du Verdaj partioj en Bulgario:

<http://europeangreens.eu/green-parties/bulgarian-green-party>

<http://www.greenparty.bg/>

<http://europeangreens.eu/green-parties/zelenite>

<http://www.zelenite.bg/>

europangreens.eu/news/bulgarian-parliament-votes-against-belene-nuclear-plant

2013-02-15 **Vizitoj el la Kosmo:** la **atendita** preterpasinta asteroido 2012DA14 flugis kiel kalkulite je ghentila distanco de 28 000 km, sed la **ne-atendita** kaj felice malpli granda meteorito knalegis super Cheljabinsk kaj vundigis milojn da homoj pro rompigitaj fenestroj. Post Tunguska, 1908, ghi estis la dua raportita sufiche granda meteorito.

Komento AVE/mw: **Imagu se tia objekto falus** - tute hazarde - **sur atom-reaktoron** au ties banon por la fuelo-stangoj, au sur atendanta atomrakedo ? Chu oni jam kalkulis tian okazajhon ? Mi povas imagi ke tiamaniere la akvo en la reaktorujo tuj forsphucas, kaj ke la uranio estus kunpremata je la fundo kaj tuj eksplodos kiel atombomo - au ghi vaporighas kaj estos disjhetata en la chirkauajhon - kiu scias ?

(lau diversaj informoj: ekz-e Bad. Ztg., 2013-02-16, p.1, ktp.)

2012-12 Radioaktiva karbon-fontano en Munkeno

FRM2 de la Teknika Universitato de Munkeno en Garching.

Jam komence de Novembro tiu esplor-reaktoro estis haltigita, char la eligoj de C-14 (la radioaktiva isotopo de karbono) jam alproksimighis la jaran permeso-limon. Kutime tiaj lim-valoroj estas dekoble pli altaj ol la normala eligoj. Pro tio protestis la Umweltinstitut München.

<http://nl.umweltinstitut.org/app/lt/?l=2uef.198a8.3amg2pjqlwp>

Minado, Resursoj, Nafto & Ercoj, Kemio , Fajroj, Eksplodoj

2013-09-10 Chu Sirio pretas detruigi siajn kemio-armilojn ?

Laudinde estas Obama, char li atendis kaj diskutis - finfine kun Putin - kaj post la evidenta pruvo (ankorau ne oficialigita) ke mortigaj kemio-armiloj estis uzataj kiu mortigis kruele plurajn centojn da civiluloj.

Vershajnas - sed mankas pruvoj, ke la shtata armeo faris tiun malpermesitan atakon. Char la UN Sekureca Konsilio ne trovis unuanimecon, mankas la rajto zorgi perforte por milit-halto (kiun devis akcepti la registaro kaj la diversaj ribelulaj grupoj). Siria diplomato montris pretecon por interkonsenti.

(lau dradio.de)

Komento AVE/mw: Pafi kelkajn rakedojn certe ne finos la suferon de la popolo.

Se Sirio vere interkonsentas fordoni la kemiajn armilojn por detruji ilin, kaj ratifi la Deklaracion por Malpermesi Kemiajn Armilojn tio povus esti komenco ankau de paciga interkonsento.

(je la jarfino 2013): Jes, internacia agado por malkonstrui ilin, sed prokrastita.

2013-09-10 Romano finfine baras oro-ekspluatadon en Rosha Montana

Kanada firmao (Gabriel Resources) planis tie ekspluati grandskale oron kaj arghenton. Unue temas pri la pejzagho en la Karpatoj kiu estus detruita kaj homoj kiuj perdis sian hejmon.

Due temas pri tio, ke la lando ne profitus pro malaltaj licenzo-kotizoj.

Trie temas pri la uzado de cianido por solvi la oron el la shtonaro - vi eble rememoras, ke antau kelkaj jaroj mortis milionojn da fishoj en la Tiza kaj Danubo pro krevighinta barlago - kiu enhavis cianidajn ab-akvon (rub-akvon).

(lau informo de Deutschlandfunk 2013-09-10, www.dradio.de)

2013-07-16 Chinio plibonigas siajn mediajn problemojn:

Chinio klopdas plibonighi la mediajn problemojn, kaj la sekureco-mankojn de la grandskala minado. Chi-rilate ili kunlaboras kun la Teknika Altlernejo Bochum, kiu akiris spertojn je la germana karbo-regiono Ruhrgebiet.

(lau taz, 2013-07-16, p. 8)

2013-05-06 **De kemio-trajno elreleghis 3 vagonoj en Gent, Belgio,** ili eksplodis kaj

kauzis katastrofon. Unu homo mortis pro la venenaj vaporoj (Akril-nitrilo, baza materialo por plastajhoj); por 49 aliaj sufichis la malsanulejo. (Iau dpa, Bad.Ztg. 2013-05-06, p.12)

2013-05-08 en **Rostov che Don (Rusio) elreleghis trajno kun fuel-gasoj kiuj eksplodis**, kun ghis nun nekonataj sekvoj. (DLF)

2013-05 **Brul-katastrofo mortigas pli ol 800 teksajh-laboristojn en Dakka** (Bangladesho).

Kauzo estas, ke la konstruantoj ne atentis la kvaliton sed chefe la profiton; la importistoj postulas malaltajn prezojn por sukcesi en la konkurenco. Oni varbas per malaltaj prezoj.

Komento AVE/mw: Do, gravas havi la rel-sistemon kaj vagonojn - kaj ankaŭ kamionojn, fabrikojn, teknikajn sistemojn ktp. - en bona stato.

2013-04 **Frakado (krevigado) por ekspluati ter-gason kaj nafton** estas ne-daurigeble tekniko. Pli bone rezigni, ĉar la daŭraj sekvoj povas kosti pli ol la gajno el la vendo. Tiaj fontoj mem estas elĉerpotaj jam post kelkaj jaroj. Serĉu sub „Fracking“ en Vikipedio; ekzistas gherma artikolo ankaŭ en Esperanto.

2013-01 **Peticio favore al praarbaro en centra Ekvadoro**, parte en la Nacia Parko Yasuni:

Kichua-tribanoj protestas kontraŭ nafto-ekspluatado en la regiono kie devenas la Amazono, ĉar ili jam spertis - flanke de Texaco kaj aliaj - ke la nafto-ekspluatado detruas la ekosistemon de la praarbaro.

La tribo en Sani Isla decidis ne vendi sian teron de 4 milionoj hektaroj, sed la registaro klopodas persvadi la homojn

La prezidento Correa iam deklaris respekti la konstitucian rajton de "Patrino Tero", kaj sukcesis, ke aliaj registaroj subtenas ilin kaj pagadas por la ne-ekspluatado. Sed nun oficistoj vojaĝas al nafato-konzerno por kontrakti. Bonvolu kune protesti - mankas cent mil al 1miljono:

http://www.avaaz.org/de/oil_in_the_amazon_global/?bGgALab&v=21300

Komento (AVE/mw): Antaŭ-nelonge mi legis la libron "La Blanka Rozo", de B. Traven, kiu temas pri la krima forpreno de posedrajto flanke de Usona nafto-konzerno. La tereno apartenis al la logantaro de granda bieno "La Blanka Rozo", kies patrono diris ke ili ne rajtas vendi ĝin. Tiu libro tre bone klarigas la aferon, kiu evidente ankoraŭ ne tro shanghighis. Pli pri tiu verkisto, kiu favoris la revolucion en Meksiko, kaj mortis 1969 en Meksiko-urbo: http://de.wikipedia.org/wiki/B._Traven

2013-01: **Skista gaso - Ne Dankon !**

Jen informo kial la ekspluato de tia resurso estas tro danĝera:

(en) <http://www.stopclimatechange.net/index.php?id=shalegas>

Sube de tiu pagho vi povas elshuti informilon en la jenaj lingvoj: (bg, cz, de, en, fr, pl, ro, sv) (AVE klopodas traduki ĝin en la anglan)

2013-01 : **Oro ne nur brilas, sed ankaŭ radias:**

Mi ĵus legis pri radioaktiva poluo de grundakvo, pro elfluoj de ormineja kompanio AngloGold Ashanti, en la nordokcidenta provinco de Sudafriko.

Orminejoj en tiu regiono ofte elfosas danĝerajn kvantojn de uranio kun la oro. Se ne sufichas por koncentriĝo kaj vendo kiel dua produkto, la uranio restas en la forjhetata pulverita shtono. Oni konsciu ke en 1000 kg de elfosita shtono, trovighas nur ~ 4 g de oro. En tiu poluo kazo, la grundakvo estas tre movebla kaj nur 7 km for de granda rivero Vaal, kio estas grava akvo-stoko por multaj komunumoj kaj bienistoj.

<http://mg.co.za/article/2013-01-08-mine-charged-with-radioactive-contamination>

Cetere, la 100-jara ormineja industrio en Sudafriko verŝajne ĉesos en la venontaj 10

jaroj. Produktado nun estas nur sesono de tiom antaŭ 20 jaroj - la resurso estas elĉerpita. Sed restas multaj medio-riskoj.
(de Prof Harro von Blottnitz (Pr.Eng.), Chemical Engineering Department, University of Cape Town)

Ekonomio, Financoj, Tekniko, Trafiko

2013-11 **Le Monde Diplomatique detale analizas TAFTA/ TTIP**

Antaŭ 10 jaroj la Europa Parlamento rifuzis la MAI-Traktaton (multflanka traktato pri investoj).

Nun minacas TAFTA - pli eble poste ... (temas ankau pri NSA, GMO, politika memstareco)

(lau Lori Wallach, en la germana versio de LMD Novembro 2013, kaj alia en Dec-o)

2013-11 **EU kreis absurdistan: limo-hhaozo**

Ne temas pri literatura au filmo, temas pri stranga realeco - ridinde; bedaurinde ne ridinda por la trafitaj homoj.

En Metkovic, suda Kroatio & Bosnio, trovighas la Marulic-Strato kiu difnas la limon inter Bosnio -HG kaj Kroatio. Ĉar temas pri la ekstera limo de EU, la homoj devus daŭre ŝanĝi la limon je la normala vivo. Vendistoj perdas la ekziston, la kroata ĝardenisto ne rajtas vendi siajn legomojn kiuj kreskas en apuda Bosnio.

Feliĉe la lingvo ne estas problemo. Solvinda kaj solvenda problemeto por foraj bruselaj EU-burokratoj.

Jen raporto en la germana TV:

http://www.tagesschau.de/videoblog/in_wien_faengt_der_balkan_an/eu-aussengrenze-kroatien100.html

2013-12-09 MKO (WTO) finfine ricevis minimuman interkonsenton sur Bali

La sesio de la Monda Komerca Organizo sukcesis almenaŭ decidi pri 3 temoj:

- redukti burokratajn barojn je la limoj;
- plifaciligado de merkato-aliro por la plej malriĉaj landoj;
- kaj akceptis la rajton, ekz-e de Hindio, aĉeti nutraĵojn por stoki ĝin, kaj poste vendi sub la merkata prezo. Sed tiu ebleco validas nur por similaj ekzistantaj programoj.

Jam en la faraona Egiptio, la ŝaha ministro Josefo aĉetigis grenon dum la rikolto estis abunda, kaj stokis ĝin por la tempo de malabundeco; por stabiligi la prezon (en ambau direktojn).

ATTAC kritikis la rezulton, ke ĝi estas ne sufiĉe juste ekvilibrita.

(lau Nicola Liebert, taz, 2013-12-09, p.2)

2013-10-30 **Kontraŭi kashitan lobiadon en la EU**

Ni esperantistoj scias, ke lobiado necesas. Tamen, tro ofte la lobiado agadas kashite, parte eĉ pre-skribas legh-proponojn. Parte temas pri rekta korupcio.

Lasta ekzemplo en Germanio: La familio Quandt kiu plejparte posedas BMW (konataj automobilofirmao) donacis al la regantaj partioj en Germanio: CDU/CSU kaj ankoraŭ FDP entute ĉ. 1 milionon Euroj.

La donaco estis laŭ leghe indikita - do, eĉ mal-kashita. Tamen temas pri korupcio, ĉar la nuna registaro (ankoraŭ la malnova) sukcesis ke EU prokrastas la enkondukon de pli malaltaj automobil-elir-gasaj limvaloroj por CO2 por kelkaj jaroj. Decido kiu tre helpas al tiuj firmaoj.

La Verduloj postulas redukton da tiaj donacoj al 50 mil; ankoraŭ multe, sed ne tiom decidante.

Se vi loghas en Germanio - bonvolu subteni la germanan CSO* „Lobbycontrol“ kiu postulas mal-kashitan lobiadon ene de EU:

<https://www.lobbycontrol.de/2013/10/aktion-verborgene-lobbyarbeit-in-der-eu-beenden/>

*) CSO = CivilSocia organizo, antaŭe nomita NRO = Ne-Registara Organizo

Komento AVE/mw: mi ne trovis ligon al simila CSO en aliaj landoj - chu vi ?

2013-10-20 Pri la temo **bio-fueloj - „benzinujo au telero“**

vi povas legi detalojn de germana instituto pri renovighantaj energioj:
(de, en) <http://www.unendlich-viel-energie.de/de/detailansicht/article/4/biokraftstoffe-sind-besser-als-ih-ruf.html>

2013-08-09 Bonvolu **subteni sindikatanon en Peruo:**

La nova leĝo en Peruo pri publikaj servoj celas detruigi la forton de sindikatoj. La leĝo jam pasis la landan kongreson, kaj se prezidanto Humala aprobas ĝin, la leĝo

- * nuligas la rajton de la sindikato intertrakti salajrojn
- * difinas modelon de sindikata organizado en la branĉo
- * ebligas reformojn pri la strukturo de laboro kaj de publikaj servoj sen leĝdona konsilo
- * nei la strik-raĵon en t.n. esencaj branĉoj, sen ia difino, kiuj branĉoj estas esencaj.

La Perua registaro estas konfrontita kun kreskanta movado de protestoj kaj strikoj kontraŭ korupteco kaj malalta pagado – ne estu akceptite, ke la kulpo estas ĉe la serioze deĵoranta laboristaro de la publika servo.

Se Vi opinias, ke ĉiu laboristo posedas la rajton al sendependa sindikato kaj kolektiva intertraktado, **bonvole sendi mesaĝon kun peto al prezidento Humala** nuligi la plej perniciozajn (detruajn) aspektojn de tiu ĉi leĝo.

(eo) http://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=1932
(sendita de Eric Lee)

2013-07-09 **Usono kaj EU diskutas pri libera merkato:**

Usono postulas regulojn kiuj allasas jugh-alvokon de firmaoj kontraŭ shtataj decidoj. Tiamaniere Philip Morris (tabako) povis ekprocesi kontraŭ Uruguajo pro ties san-rilataj avertoj sur cigaredo-pakajhoj. La aktualaj postuloj flanke de EU estas tre ne-precizaj kaj malfermus pardonon ankaŭ por GMO-plantoj.
(Iau Jost Maurin, Bad. Ztg. 2013-07-09, p.8)

2013-07-11 **Lobiado - ekzemple en Germanio**

Germanio ankoraŭ ne ratifis la UN-Konvencion kontraŭ lobiado.

Lobiado ne estas tiom travidebla kiom necesus.

Eblas influi politikistojn au partiojn pere de pagoj.

Ankaŭ eblas al politikistoj ighi lobiisto tuj post sia tempo kiel elektita politikisto.

La aktuala registaro kaj ties kristanaj kaj liberalaj partioj rifuzis limigi kaj la influon per lobiistoj, kaj fari iliajn rilatojn travideblaj. Jen la detaloj (en la germana) - supozeble en kelkaj aliaj landoj estas similaj mis-faradoj:

(de) <https://www.lobbycontrol.de/2013/06/schwarz-gelb-versagt-beim-lobbyismus/>

2013-04-06 **Germanio fraudemas european kason pro Stuttgart 21** (S21, planita tunela stacidomo en Stuttgart):

Post iom da penoj la pensiighita jughisto Christoph Strecker eltrovis, ke la Ministerio pri Trafiko de Germanio postulas subvenicon je 114 milionoj* de EU, kaj akuzis la respondeculojn donante falsan aserton: ke „la nova subtera stacidomo, kiu ebligas traveturon, duobligos la povumon“ (kompare kun la jam ekzistanta). Tiu aserto estas tute malghusta, ĉar la nova stacidomo fakte ebligas eĉ malpli altan horan frekvencon, ĉar ghi havas nur 8 anstataŭ 16 relojn.

La kancelierino de Germanio, Merkel, kiu fervoras tiun projekton, samtempe postulas austerecan politikon - kiam temas pri landoj kiuj havas financajn problemojn.

Se vi volas legi pli detale pri la projekto S21, vi povas aĉeti la jarlibron de TAKE 2012 (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) au rete peti la dosieron de ave@verduloj.org.

La kompleta teksto pri tiu temo - jen ligoj al diversaj lingvoj:

<http://www.bei-abriss-aufstand.de/2013/04/02/aktionsbundesfordert-von-frau-merkel-umgehende-klarung-zum-s21-eu-subventionsbetrug/>

Kaj jen la teksto en la germana: <http://wordpress.k21.webseiten.cc/aktionsbuendnis-fordert-von-bundeskanzlerin-merkel-umgehende-klarung-des-eu-subventionsskandals/>

*) fakte 114 milionoj estas kvazau neglektinde kompare kun 6 miljarde pli.
Komento AVE/mw: Rusio planas plibonigi la ambau branĉojn de la Trans-Siberia Fervojo per egal-alta sumo; do, pridiskutinda enterigon da provinca stacidomo Stuttgart (por ŝpari ĉirkaŭ 8 minutojn) kostos simile kiel la renovigo de ĉ. 15.000 km da fervojo.

2013-03 **Planita obsolesko (malbonigo) da produktoj**

Jen konciza artikolo en vikipedio: <http://eo.wikipedia.org/wiki/Obsoleto>
kie vi trovos pli detalajn en aliaj lingvoj.

Kaj jen plurlingva retejo: <http://www.murks-nein-danke.de>

(Murks (germane) - malbonkvalite farita produkto)

(parte laŭ Michaele Zischek, taz, 2013-03-21, p.8)

2013-02: **Verduloj en la Europa Parlamento por la Rajto-al-Akvo:**

(1) La EC (Europa Komisiono) prezentis revizion pri la Publikaj Mendo-donaj Reguloj. La Verda Frakcio (Verduloj/Regionalistoj kaj Piratoj) komune voĉdonis kontraŭe. Ili argumentis, ke aparte la bazaj temoj Akvo kaj Socialaj Servoj estu eks-krampigitaj el tiu regularo, ĉar ili ne estas submetindaj al la profitcela merkato. (pli - ankaŭ en aliaj lingvoj)

www.heide-ruehle.de/heide/fe/pub/de/europapolitik/revision%20beschaffungsregeln

(2) Intertempe la Europa Civitana Iniciativo "Rajto al Akvo", pri kiu mi informis antaŭ unu monato, atingis la sojlon de unu miliono, sed bezonatas certa kvanto en pluraj landoj de la EU. La Verduloj subtenas la peticion. Se vi ankoraŭ ne subskribis, jen la ret-ligo en ĉiuj oficialaj europaj lingvoj: www.right2water.eu/

(3) EU / EP: Pozitiva rezulto de voĉdono en la EP por pli respondeca fishkapto-politiko. Unu el la atingoj estas, ke la (industriaj) fishistoj ne rajtas rejheti nebezonatajn fishojn en la maron, ĉar tiuj plejparte ne plu vivas, aŭ estis difektitaj dum la kaptado. Fakte ĝi reduktas la kvanton.

www.greens-efa.eu/de/reform-der-eu-fischereipolitik-9142.html

2013-01 **Bonvolu subskribi ECI-on kontraŭ privatigo de la akvo-provizado**

ECI = **Europa Civitana Iniciativo**, kiu validas post 1 miliono da subskriboj.

La civitanoj en Berlino sukcesis, ke la urbo re-achetas la akvoproviza firmao, ĉar montrighis ke la privata firmao ĉefe altigis la prezon, sed neglektis la kvaliton de la akvo.

Nun, la EU-komisaro Bannier prezentis regularon por EU, kiu konsekvence donos la tutan akvo-provizon al la merkato. Tio signifus. Se firmao pagas pli - ili ricevas la licencon; kaj la firmaoj kutime povas pagi pli ol urbo aŭ ŝtato kiu ne havas monon. La aktuala kazo estas por tiuj landoj kiuj havas financajn problemojn: Portugalio kaj Grekio - EU premas ilin vendi la akvo-provizon.

En filmo de germana Monitor-TV estas protestoj de portuala urbo, kie homoj plendas, ke ili ne plu povas pagi la altigitajn kostojn. Kaj pli: la komisaro lernas de konsultanta asocio kie plejparte partoprenas la grandaj akvo-provizaj konzernoj: Veolia, Suez, RWE, ...; do la lobiistoj diktis la regularon.

Ankaŭ en aliaj okazajhoj montrighis ke la lobio rekte influis la decidojn, ekz-e pri GMO !
Pliaj informoj (en la germana)

Attac-Germanio: <http://ppp-irrweg.de/index.php?id=12037>

TV-elsendo (de): <http://www.wdr.de/tv/monitor/sendungen/2012/1213/wasser.php5>
supozeble vi trovos la informojn ankaŭ en via lando je Attac aŭ simila CSI (Civil-Socia-Iniciativo/ NRO)).

Jen la ret-ligo por via subteno - NE al privatigo de la akvoprovizo

lingvo elektebla (ĉiuj oficialaj EU-lingvoj), iom formala afero: www.right2water.eu/de
(dankon al Ursula)

2013-03-30 Mi ghojas ke evidente - kaj espereble - **Italio ricevos denove la teknikan registaron de Monti**, char la demokratie elektitaj partioj kaj personoj ne povis kunlabori por sia lando. kaj la klauno lavas siajn manojn, sed ne emas malpurigi ilin per malfacilaj politikaj decidoj.

Interesa informo chirilate - kaj ankau rilate la kongreslandon de la UK: Islando:

Mi audis raporton, ke en Islando ankau la klaunoj kaj artistoj estis elektitaj por regadi, kaj ke ili tre bone kaj saghe laboras. Kompreneble ili devas shpari, kion oni rimarkas je la stratoj kaj bedaurinde ankau je la lernejoj, sed ili - kontraste al Usono kaj Hispanio - ne lasis eljheti la familiojn el la domoj au loghejoj, kiujn ili ne plu povis pagi la interezon (ankau tie la valoro de la domoj falegis). La shtato garantias por la domoj, kaj la bankoj malpli rapide (kaj eble malpli ?) ricevas sian monon.

Do, tio estas hom-adekvata solvo de la financa krizo, dank al la klaunoj.
(lau diversaj informoj - kaj opinio de manfred)

2013-03 **Kiprio savita** - sed malbone organizita.

Certe estas adekvata ke la richuloj devas kontribui per parto de sia mono, char ili antaue konis la riskon: Se iu promesas altan interzon (kiel faris la bankoj en Kiprio) oni samtempe havas altan riskon.

Sed la EU-komisiono tiuj povus rimarki, ke la limo de 100.000 Euroj estas lau EUropa nivelo, kaj malpli alta nivelo ne estus tre juste.

(opinio de manfred)

2013-01 **Irlando**, prezidenteco de EU dum la unua duonjaro de 2013 - **konkurencas per malaltaj impostoj**

Sur ghia retejo: <http://www.eu2013.ie/> ili varbas por tiu malafabla sinteno:

"Ireland has a transparent and simple 12.5% corporate tax rate on trading income. We also have an extensive and expanding network of high quality tax treaties."

Do, unue 12,5%a imposto por firmaoj estas tre malalta, kaj ne sufichas por pagi la bezonatan infrastrukturon.

Kaj due ili oficiale subtenas la eblecon kashi impostojn, kio helpas al konzernoj kaj alia mafio kashi profitojn.

Pro tio protestas Sven Gigold, MEP Verduloj/Regionalistoj:

<http://www.gruene-europa.de/irland-missbraucht-seine-ratspraesidentschaft-8915.html>

2012-12: **Konzernoj kiuj preskau ne pagas impostojn:**

APPLE, GOOGLE, IKEA, STARBUCKS, k.t.p. - aparte konzernoj kies sukceso bazighas sur patentoj estas tre aktivaj en la kashado de la profitoj:

1. En europaj landoj (kaj certe ankau en aliaj) la sidejoj de iliaj filioj trovighas en landoj kun malalta imposto-kvoto; dank al Schengen, tio estas tute legala.

2. Tiuj europaj filioj devas pagi licencokotizoj al aliaj filioj kiuj troighas en t.n. imposto-paradizoj - tiamaniere la tutmondaj konzernoj shovas la profiton en sian poshegon. Fakte - la afero estas iomete pli komplika; sed tamen mal-sociala konduto.

3. Apple lasis produkti siajn i-produktojn en fabrikoj kie homoj laboras sub alta strecho kaj malbonaj kondicho. Oni legis plurfoje pri memmortigoj ekz-de laboristoj de Foxconn en P.R.Chinio. Espereble tiaj situacioj iomete plibonighis post la tutmonda protesto.

<http://www.zeit.de/wirtschaft/2012-11/steuertricks-technologiekonzerne>

Alia metodo - lobiado por eviti impostojn: La grekaj ship-entreprenistoj devis pagi nur malaltajn impostojn. Lau kalkuloj temas pri 175 miljarde usonaj dolaroj ene de dek jaroj - por Grekio.

La postulo de la verda germana parlamentano, Gerhard Schick, estas EU-skala kaj tutmonda kooperado por konvena impostado de ship-vetur-entreprenoj. (2012-12-21, <http://www.gerhardschick.net/>)